



Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA - DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal 31 - Ap. 73 Caixa Postal 07-1055

Telefone 4-8035

11.100 - Santos (SP)

SECRETARIA

Telefone 42-9090

70.000 - Brasília (DF)

Nº 8 - SETEMBRO DE 1975 - BOLETIM INFORMATIVO

Redação:- Maria Almada

BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

Brazilio, la sidejo de BKE estas urbo de futuro, kiel Esperanto por internacia interkomprenigado. La moderna ĉefurbo, laŭ opinio de multaj personoj estas super moderna, nekomprenebla pro ĝia rapida progreso. Ĝi iĝas revo de ĉiuj, kiel la internacia komunikilo iĝas nepre necesa. Ni laboras por la estonto, progreso kaj akompanas la rapidan vivmanieron de la dudekaj jarcento. Ni esperantistoj estas dediĉitaj al Esperanto, kaj nin la venontaj generacioj memoros pro nia pionira agado. Zamenhof sciis tion kaj diris:

"Kuraĝe antaŭen! La nepoj vin benos se vi paciencelatenos".

Ni rekonas, ke niaj gesamideanoj kuraĝe marŝas antaŭen.

BKE nepre bezonas propran sidejon en Brazilio. Estas decidite aliformigi la organizon en edukkan organon. Tiel la agado estos pli serioze traktita de la aŭtoritatoj. BKE eklaboris pasintjare havante malplena la kason, sed kuraĝo ne mankis, nek deziro savi nian movadon.

Havante sidejon estos al ni eble organizi amikan rondon, fratan kunlaboron, familian etoson, pro tio ni klopodas realigi nian planon kalkulante je helpe de niaj sindonaĵoj gesamideanoj, kies agmaniero nin kuraĝigas apelacii, kio es-

tas nun farata, ĉar ni forte kredas, ke ilia komprenemo rekonos la bezonon de sidejo kaj la postulon de nia agado, celante reakiri la iaman famon, fortigante la movadon. Dio rekompensu la bonajn geamikojn!

BKE kreskas ĉiumomente kaj venkos ĉiajn malfacilaĵojn de la nuno!

--XX--

KORE NI DANKAS la jenajn kontribuojn de ge-sroj:
D-ro Alberto Flores 50,-
Bauru E. Societo 60,-
Maria Almada 200,-
Manoel M. Queiroz 100,-
Kruzejroj... 410,-

NOVAJ VICPREZIDANTOJ

S-ro José Saraiva Matos, por la fako "TURISMO", estis nomumita en la 2a de septembro. Ni dankas. F-ino Maria Luíza Bilot por la fako "ESPERANTO INSTRUADO", same en la 2-a de septembro. Ni dankas kaj kalkulas je ilia kunlaborado.

SCIIGOJ

S. João da Boa Vista (SP)
Nosso colaborador vice presidente D-ro Jatir G. Vieira informou-nos que a Prefeitura Municipal de S. João da Boa Vista acaba de regulamentar o Decr. Lei Nº 108, de 04 de julho último pelo Decr. Lei

Nº 141, de 22 de agosto de 1975, alusivo ao prêmio Lazaro L. Zamenhof, instituído para ser outorgado anualmente ao melhor trabalho relacionado com a língua Esperanto. Pela regulamentação o prêmio será dividido em três partes iguais correspondentes aos setores literário, ensino e correspondência.

Barra Mansa (RJ) - Nia vicprezidanto Wilson Pereira Deslanges, el Barra Mansa, sendis al ni eltranĉaĵon de la gazeto "Lider", kiu per bona kaj utila artikolo verkita de lia edzino, Samino Denise Arneiro Deslanges, diskonigas la ideologion. Ĝi traktas la okazintan esperantan Seminarion en la urbo Valença (RJ).

Nia aktiva samideano Wilson estas novbakita esperantisto. Li, lia edzino kaj filino ĵus lernis la internacian idiomon en Valença, kie ili ricevis diplomojn.

Ofte la homoj senkulpigas sin pro manko de tempo por lerni Esperanton. Niaj gesamideanoj el Barra Mansa vojaĝis nokte al Valença por ĉe esti la lecionojn.

Se iu pro manko de tempo ne povas lerni, me

moru pri tiuj sindonaj kaj klopodemaj gesamideanoj, kiuj estas sendube imitindaj ekzemploj. Gratulon, gesamideanoj Deslanges!

San-Paŭlo (SP) - Por disvastigi la Internacian Lingvon, niaj jam bone konataj gesamideanoj Elvira Fontes - vicprezidentino de nia BKE - kaj Eurico Ribeiro, helpataj de Kelkaj anoj de San-Paŭlo Esperanto-Asocio, fortostreĉas por starigi librovendejon en San-Paŭlo.

Tiamaniere ili intencas solvi la problemon financan de S.P.E.A.

"Kion mi scipovas mi dankas al libroj" -diris Maksim Gorki.

La jarfinaj festotagoj alproksimiĝas kaj por helpi la movadon akiru ni librojn en S.P.E.A.

Vere la plej utila kaj delikata donaco estas la libro. Donacu ni librojn al niaj parencoj kaj geamikoj. Pere de libroj ni disvastigas la kulturon de Brazilo inter fremdlandanojn geamikojn aŭ diskonigas Esperanton inter brazilanojn.

La jenaj legaĵoj estas rekomendindaj:

Mi estas Pelé, vivo de la fama futbalisto, traduko de F.S.Almada, nia prezidanto;

Dr Esperanto, originala romano de nia vicprezidanto D-ro Walter Francini; portugale verkita. Por Iu Pli Bona Mondo - Tra poezio kaj Esperanto, de Sylla Chaves, premiita de UEA;

A Língua das Nações, de B. Egon Breitenbach, en portugala lingvo.

Adreso de San-Paŭlo Esperanto-Asocio: Caixa Postal Nº 5.888-CEP 0.1000-San Paŭlo (SP).

Goiânia (GO) - "Grava estas la volo-Venki"! Skribis al ni nia juna samideanino Nêia Lúcia Souza el Gojania. Nia redakcio ŝatus ricevi plurajn opiniojn de niaj gejunuloj. Bonvolu skribi al ni!

El EŬROPO. Nia redakcio ricevis salutkarton, senditan de niaj gesamideanoj Grattapaglia kaj Renato Diniz, fondinto de la bieno "Bona Espero". Ili informis nin pri la bona sukceso de la Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Kopenhago (Danlando).

Niaj geamideanoj vojaĝis tra tuta Eŭropo por fari konferencojn pri ilia laboro en "Bona Espero", kie ili prizorgas kaj instruas orfajn infanojn. Ili sukcesis vekti la atenton de fremdlandanoj, kiuj promesis vizitila bienon kaj helpi la

klopodojn de niaj gesami-
deanoj.

Dum la UK en Kopenhago
nia samideano D-ro Car-
los Lima Mello kaj D-ri-
no M.C. Rodrigues rice-
vis la UMEA-premio (Uni-
versala Medicina Esperan-
to-Asocio) aljuĝita de
D-ro Ideo Shinoda pro la
medicinaj esploroj publi-
kigitaj en la revuo "Es-
peranto". La premio kon-
sistis el argenta medalo
kaj 100,00 guldenoj.

--XX--

SOCIETO ZAMENHOF

Kiel membroj de la So-
cieto Zamenhof, la prezi-
danto de nia BKE kaj la
redaktorino de Ĉi tiu In-
forma Bulteno, ĵus rice-
vis de D-ro Humphrey Ton-
kin, prezidanto de la U-
niversala Esperanto A-
socio, leteron el la 19-
a de julio pasinta, in-
formante pri la nuna si-
tuacio de la Societo, es-
perante, ke la nombro de
la aliĝintoj kreskos.
Laŭlanda distribuo de la
unuaj 140 membroj:

Argentino	1
Aŭstralio	1
Aŭstrio	1
Belgio	5
Brazilo	5
Britio	5
Danlando	3
F.R.Germanio	11
Finnlando	2

Daŭrigota 34

Daŭrigo	34
Francio	3
Hispanio	4
Italio	2
Japanio	2
Kanado	2
Meksikio	1
Nederlando	12
Norvegio	8
Novzelando	2
Portugalio	1
Svedio	34
Svislando	1
Usono	34
	140

D-ro Tonkin diris, ke
li estas kontenta, sed
strebos varbi ĝis 200
membrojn en la nuna jaro.
Kiu volas partopreni ti-
un elstaran organizon?

Li atentigas, ke la dis-
tribuido inter 22 landoj
estas tre malegala, kaj
li speciale rimarkigas,
ke Svedio kaj Usono es-
tas laŭdindaj kontribu-
antoj. Tiaj kontribuoj
estas bonvenaj pro tio,
ke la financa situacio de
UEA estas ankoraŭ febla.

--X--

Brotas (SP) En tiu urbo
trovigas radioamatoro,
kiu elsendas pere de sia
radioaparato Esperanto-
lecionojn. Estas nia sa-
mideano Antonio Alves de
Carvalho. Antaŭen, kara
samideano!

Pôrto Alegre (RS)-El nia kara samideano B. Egon Breitenbach ni ricevis 4 ekzemplerojn de lia libro "A Língua das Nações" kiel donaco al nia BKE. Ni kore dankas.

--XX--

JUBILEA KONGRESO KOPENHAGO

La 60-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Kopenhago (Danlando), laŭ informo de "Heroldo de Esperanto", estas harmonia, optimisma kaj sukcesa". En mondo, en kiu 90% de la internaciaj kongresoj ne superas 500 partoprenantojn, la Universala Kongreso en Kopenhago, kun siaj pli ol 1200 aliĝintoj, apartenas, laŭnombro, al la elito.

"Tamen", -daŭrigas la gazeto, -"laŭ esperantista tradicio kaj juĝ-kriterio, la Kopenhagaj ciferoj aspektas relative modestaj. Feliĉe, la sukceso de kongreso ne dependas nur de la nombro da aliĝintoj, sed ankaŭ de la graveco de la programoj kaj decidoj, kaj de la interna etoso. En tiu rilato la 60-a U.K. superis plurajn lastjarajn.

Ĝi montris la unuecon de la Movado, la neŝanceliĝon de ĝia neutraleco,

la ĝeneralan dinamismon en la serĉado de novaj vojoj por la disvastigo de la internacia lingvo kaj por la solvo de strukturaj kaj administraj problemoj, la deziron enterigi malnovajn konfliktojn".

Ĉe la inaŭguro de la U.K. la prezidanto de la Universala Esperanto Asocio, D-ro Tonkin, diris: "Ni estas kontraŭ la ŝtonepokaj rimedoj de komunikado".

Tiuj vortoj estas sendube tre gravaj; ni devas nepre atenti pri ili!

--X--

Campos (RJ) - Nia vicprezidantino Maria Luiza Bilot aktivas kiel Esperanto-instruistino en la "Esperanto-Kurso Bezerra de Menezes", de Campos.

Ni gratulas ŝin, desiran te sukceson en la kurso.

--XX--

Santos (SP)-La grava gazeto "A Tribuna", de nia urbo, aperigas akurate artikolojn de nia prezidanto, diskonigante pri la Internacia Lingvo.

NI KONDOLENCAS.- Laŭ letero de nia samideanino Fanny Luiza Dupré, forpasis en la 11-a de la pasinta monato aŭgusto nia samideanino Mathilde C.

de Beretta, sindona kunlaborantino de la antikva SPEK - São Paulo Esperanto Klubo, kie ŝi enskribiĝis en 1938. Tiam estis prezidanto de la Klubo s-ro Oswaldo Leite de Moraes kaj kasistino Raphaëla C. Medici, kuzino de nia eks-prezidanto E.G. Medici.

--X--

Maceió(AL)-Recebemos elogia carta de nosso coidealista Francisco Alves Mata reconhecendo o

valor do trabalho do nosso CBE, num grande esforço para salvar nosso movimento que apelidou de "gigante". Nosso coidealista está repousando na Praia de Parapueira, que descreve em sua poesia, a seguir transcrita. Agradecemos suas palavras gentis e pedimos-lhe para, deixando um pouco seu repouso, prestar-nos sua preciosa assistência, colaborando com o CBE de qualquer forma.

TRABALHO INTENSO

O meu trabalho é intenso,
à noite, no céu imenso
fico estrelas a contar...
Pelo dia em praias lindas
conto as conchinhas infindas
e tomo banho de mar.

Leio, estudo e felizmente
recebo as dores contente
como um humilde cristão.
Contemplando a natureza,
se vier qualquer tristeza
espanto-a com violão...

Francisco Alves Mata

BELO HORIZONTE (MG) - Do Instituto Esperanto de Educação recebemos comunicado informando-nos da criação de dois cursos de Esperanto: elementar a cargo do Prof. Roberto Vieira de Rezende e "da uriga" pelo Prof. Adonis Marcelo S. Silva, nosso

vice-presidente. Felicitamos nossos coidealistas de Belo Horizonte.

--X--

INDAIATUBA - (SP) - Do nosso vice-presidente Prof. Wanderley Peres recebemos informação sobre a aprovação de lei naque

la cidade, pela Prefeitura Municipal, denominando "Esperanto" uma das ruas de Indaiatuba. A proposta foi feita pelo vereador Noraldino Antonio Tonoli, tendo recebido a aprovação unânime. Daremos novos detalhes sobre o acontecimento após a sua inauguração, que deverá ocorrer brevemente.

BAHÁ'Í: La mondkredo por la Nuntempe Homaro - ..Oni antaŭvidas, ke la Bahaa Kredo kondukos la homojn iom post iom al akcepto de universala kredo, kiu kunigos la spiritaĵojn kaj kulturajn breĉojn ekzistantajn. Dum tiu procedo kreskos realiĝo, ke nia baza loĵaleco estas alla tuta homaro prefere ol aliu nacio aŭ alia grupo. Tio moderigos la intenscon de la nacieco, kiu estas unu el la ĉefaj fontoj de konflikto nuntempe.

--X--

El KRISTANA AGENDO - Ne juĝu vian proksimumon laŭ liaj vestoj aŭ vizaĝo. La vero, same kiel la Regno de Dio, neniam sin montras sub eksteraj ŝajnaĵoj.

CURSO DE ESPERANTO

Por sugestão apresentada por um simpatizan-

te da Língua Internacional, resolvemos ocupar uma página do nosso boletim ensinando o Esperanto com lições à altura de qualquer principiante. Conservados os boletins, o aluno terá em pouco tempo a base necessária para prosseguir sozinho os seus estudos.

PRIMEIRA LIÇÃO

Alfabeto - o alfabeto da língua Esperanto tem 28 letras, que passaremos a citar, colocando entre parêntesis o nome de cada uma. Primeiramente citaremos as vogais: Aa, Ee, Ii, Oo, Uu. As consoantes são, pois, 23: Bb (bô), Cc (tsô), Ĉĉ (tchô), Dd (dô), Ff (fô), Gg (gô), Ĝĝ (djô), Hh (hô-aspirado), Aĥ (hô aspirado mais forte), Ĵĵ (ĵô), Ĵĵ (iô-semivogal), Kk (cô), Ll (lô) Mm (mô), Nn (nô), Pp (pô), Rr (rô), Ss (sô), Ŝŝ (xô ou Chô), Tt (tô), Ŭŭ (uô semivogal), Vv (vô), Zz (zô).

Como vimos há duas semivogais (J e Ŭ), que se usam junto de vogais formando ditongos, pois não formam sílabas se usadas

isoladamente, ao passo que as vogais formam, re presentando cada uma, uma sílaba. Entre parêntesis colocaremos sempre a pro núncia que deve ser ob- servada com rigor.

Estudemos primeiramente as vogais:

A - tem som sempre aber- to como na palavra PAI: FRATO (frátô), o acento recai sempre na penúlti- ma sílaba e o O final é sempre pronunciado como ô, porém sem acentuação, como nos vocábulos paro- xítonos: LABIO (labiô).

E - tem som sempre fecha- do como na palavra MÊDO: KREDO (crêdô); NESTO - (nêstô); RELO (rêlô).

I - é sempre agudo como em FITO: FILO (fílô); - MIA (mía); ANIMO (Anímô)

O - sempre fechado: DONI (dôni); PLORO (plôrô).

U - como no português: FUTURO (futúrô); MURO - (múrô), TURO (túrô):

As consoantes B (bô), D (dô), F(fô), K(kô), L (lô), M(mô), N(nô), P(pô), T(tô), V(vô), Z (zô), são iguais às do alfabeto português.

NITEROI (RJ) - Do nosso coi- dealista Dr. Joaquim do Couto, digno presidente do Niteroi Esperanto-Klubo recebemos, remetido no seu nome e nos do Instituto Niteroiense de Desenvolvimento Cultural e do Niteroi Esperanto-Klubo a interessante obra de Luis An- tonio Pimentel "Eles Nasce- ram em Niteroi, prefaciada por Lyad de Almeida, tratan- do de biografias de eminen- tes brasileiros, entre as quais aparece a do esperan- tista Adolfo Everardo Back- heuser, o introdutor do es- peranto no Brasil; fundador do Clube Brasileiro Esperan- tista e da Sociedade Brasi- leira de Cultura Germânica, tendo sido o primeiro presi- dente das duas instituições. Precisamos homenagear o pio- neiro do movimento esperan- tista no Brasil. Ele nasceu em 28 de maio de 1879, na be- la Niteroi, tendo falecido em 10 de outubro de 1952. A- gradecemos a gentileza do nosso coidealista.